

SEE A TREAT IN STORE --- "TUTAMERIKA NUMERO DE KVAR NOVMONDAJ ESPERANTO-GAZETJOJ."

The call which has gone forth, with echoes in many quarters, for a closer fraternal collaboration among the Esperantists of the two Americas, in these days of crisis in world affairs, can not bring complete or large scale realization all at once. But several steps toward this end are under active consideration and correspondence.

The undertaking which is farthest advanced toward consummation is for a joint number of the four magazines officially representing four "landasocioj," to be printed in Brazil, and copies to be distributed to all members of the four national Esperanto societies, (Argentine, Brazilian, Canadian, and "Usonian,") as well as to isolated groups and individuals in several other countries.

This expected special number, printed in Esperanto, with at least twelve good sized pages, will contain three pages furnished by our own EANA, three furnished by the Brazilia Ligo Esperantista, three by the Argentina Esperanto-Asocio, and three divided between the Kanada Esperantista Asocio and the "izoluloj."

The only important detail not yet definitely arranged for refers to the date when the first fruit of the new collaboration will appear. We hope that in our April issue we shall be able to give our members definite information on this and other related details.

-- Vivu kunlaborado! En unuiĝo estas forto!

A BARGAIN --- FOR THOSE WHO READ. The central office of EANA has come into possession of a small stock of interesting and valuable Esperanto books, all published by the firm Literatura Mondo, which for years played such a leading role in the bringing out of important books, but which is now forced to suspend all activities because of war conditions.

These books are "broŝuritaĵ," (paper covers) but on good thick paper and desirable. Opposite the name of each book listed below is found the retail price (post paid) which must be charged to any one ordering only a single book. But in order to put these books quickly on the shelves of prospective readers, a large discount is offered for combination orders. Thus:

Any one ordering from this list books aggregating \$4.00 or more by regular prices may deduct 20%; (thus \$3.20 does the work of \$4.00) And one who orders books totaling \$8.00 or more at list prices may deduct 40%. (So that \$4.80 pays for \$8.00 worth.)

The stock is small. We have only from 3 to 5 copies of each book. And so the rule must be: "First come, first served." Here is the list:

- Cehoslovaka Antologio, (468 pages, in addition to 32 pages of art illustrations.) \$2.40
Ĉezaro (by Ivo Rotkviĉ; 536 pages, translated from German and Croatian.) \$2.00
Romano de San Michele;(large novel, from an English best seller.) \$1.95
Mr. Tot Aĉetas Mil Okulojn; (Jean Forge, original in Esperanto.) \$1.00
La Infero; Dante; (translated complete, into the original meter, by Kalocsay.) \$1.80
Streĉita Kordo; (original Esperanto poems, by K. Kalocsay.) .70
Rimportretoj, (short poems by K. Kalocsay, fully illustrated.) .30
Lingvo, Formo, Stilo; (K. Kalocsay.) .35
Gramatika Karaktero de l' Esperantaj Radikoj; (Kalocsay.) .10
"Fine Mi Komprenas Radion"; (Esperanto original, by Aisberg.) \$1.00

Some of these books may be hard to secure at any price hereafter. An early order will insure you against any disappointment, Send order and money to

E A N A - 1410 H-St., N.W., Washington, D.C.

"TFE" RADIO VERA CRUZ, station of the Brazilian Catholic Radio Society, began broadcasting Esperanto Lessons, last December. It was inaugurated by S-ro A.Couto Fernandes, member of the society advisory board, and President of the Brazilia Ligo Esperantista. Before and after the lessons, the station broadcasts Esperanto Hymns and Songs.

"OSSERVATORE ROMANO", official organ of the Vatican City, in a special article on the World Language Problem, gave much space favoring ESPERANTO.



PROGRAM

THIRTY-THIRD ANNUAL CONGRESS



Esperanto Association
OF NORTH AMERICA
(EANA)

Host: Esperanto Association of Lima, Ohio

ARGONNE HOTEL



LIMA, OHIO
JULY 5, 6, 7, 1940



6:30 P.M. Covered dish supper tendered to all Congress members, and an informal get acquainted gathering at the Plezol Club Rooms, corner North and Baxter Streets, Lima, Ohio.
THURSDAY JULY 4, 1940 Hospitality committee will be on hand to cordially greet visitors. Registration begins.

FRIDAY, JULY 5, 1940

At Argonne Hotel—Crystal Room

8:00 A.M. Completion of Registration
9:00 A.M. Official Opening of Congress
Greetings by Lima City Official
Reading of Reports
Greetings by Delegates
2:00 P.M. Business Meeting
Appointment of Committees
8:00 P.M. Tut—Esperanto Kunveno
A demonstration meeting, all in Esperanto, of songs, speeches, and dramatic presentations.

SATURDAY, JULY 6, 1940

At Argonne Hotel—Crystal Room

9:00 A.M. Business Meeting
Various Fakkunsidoj
(Science, Education, Youth, etc.)
Meeting at non-conflicting times.

EANA extends a most cordial invitation to all interested in a better world understanding, through the medium of the International Auxiliary Language ESPERANTO, to become a member of their congress and enjoy its many interesting features.

2:00 P.M. Private car jaunts to various places of interest in Lima. Leave Argonne Hotel at 2 P. M.
8:00 P.M. Gala Public Esperanto Meeting. Public cordially invited.

SUNDAY, JULY 7, 1940

At Argonne Hotel—Crystal Room

Morning— Non-denominational Church service.
Religious Fakkunsidoj following service.

Afternoon—

2:00 P.M. Reports of Fakkunsidoj
Unfinished Business
Resolution Reports
Election of Officers
7:00 P.M. Banquet
Songs, Addresses
Official Congress Photograph

The purpose of the Annual Congress of the Esperanto Association of North America is to hear reports on current activities, to provide an opportunity for members to decide on questions of policy and progress for the coming year, and to assure coordination in furthering the use of the International Auxiliary Language ESPERANTO.

LOCAL CONGRESS COMMITTEE

LIMA ESPERANTO ASSOCIATION

President.....Mrs. L. K. Beecher
Vice-President.....Mrs. Dorothy Stotts
Recording Secretary.....Miss Mary Smith
Cor. Secretary.....Mrs. Arthur Vaughn
Treasurer.....Mrs. Florence Bolton

Congress Tickets—\$3.00

(Including Points of Interest Trip Around Lima)

Local Congress Committee Address

MRS. ARTHUR VAUGHN
509 North Collett Street
Lima, Ohio

ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA.
1410 H Street, Washington, D.C.

Officers:
Pres-Joseph R. Scherer, Los Angeles, Calif.
V-Pres-Louis Dormont, Brooklyn, N.Y.
Fin. Chairman-Fred H. McMann, Troy, N.Y.
Exec. Chairman-E.G. Dodge, Washington, D.C.
Treas-Mrs Clara J. Walter, Washington, D.C.
Gen. Sec'y-Joseph Leahy, Washington, D.C.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆
33rd E A N A CONGRESS--LKK.

SUB-COMMITTEE CHAIRMEN

- Membership-----Mrs. Arthur Vaughn
Arrangements-----Mr. Floyd Spahr
Publicity-----Miss Elizabeth Cheney
Program-----Mr. Edmund Miessler
Drama-----Mrs. Frank Warner
Hospitality-----Mrs. Allen Gorrell
Hotel-----Mrs. Earl Sealts
Banquet-----Mrs. Howard Fletcher
Badge-----Mrs. Dorothy Stotts
Art-----Miss Elcore Georgenson
Music-----Mrs. Florence Bolton

LA DIA DONO
AL LA HOMARO

(Por «Pernambuco Esperantista»)

«En la komenco estis la Vorto, kaj la Vorto estis kun Dio, kaj la Vorto estis Dio», diris Sankta Johano.

En Filozofio pri da Homa Digno, skribis profesoro Faul Gille:

«Estas la abstraktismo, kiu, dank'al la memoro, iam post iom organizas la konscion, — kiu iom post iom konstruas la homajn scion kaj povon, la homajn supercon kaj majstrecon, — kiu grade kreas la inteligenton dum la etapoj de psika evoluo, kiu ekiras de protozooj kun obtuza animo ĝis la homo sapiens (homo saĝa), «reĝo de V kreitaro».

«La organo, la ilo de tiu homa majstreco, estas la PRONONCA LINGVO, LA PAROLO, la racio, — la racio, kiu, samtempe kiel ĝi analizas, ankaŭ kunordigas. Estas ĝi, kiu, laŭ la grado de ĝia evoluiĝo kaj laŭ la grado de ĝia perfektigo, levas la homon super ĝia originan situacion, diferencigas ĝin, paŝon post paŝo, penon post peno, ekde la praa besto, limigita, «tuja», preskaŭ sen ĝeneralaj ideoj kaj sen sinteza inteligenteco...»

L. L. Zamenhof diris:

«Ĉu vi ekpensis iam pri tio, kio propre levis la homaron tiel neatingeble alte super ĉiuj aliaj bestoj, kiuj ja en efektiveco estas konstruitaj laŭ tiu sama tipo, kiel la homo?»


«La tutan nian altan kulturon kaj civilizacion ni dankas nur al unu objekto: al la posedado de lingvo, kiu ebligis al ni la intersanĝado de pensoj. Kiu estas kun ni, fieraj reĝoj de la mondo, se ni ne povus lingve komunikiĝadi unuj kun la aliaj, se sian tutan scion kaj inteligentcon ĉiu el ni devus de la komenco mem ellaboradi al si mem, anstataŭ faradi uzon — dank' al intersanĝo de pensoj — de la jam pretaj fruktoj de la sperto kaj diversaj sciigoj de tutaj miljaroj, de tutaj milionoj kaj miliardoj da aliaj similaj al ni kreitajoj?»

Dank' al la lingvo kaj al la skribo la homoj venkis la tempon kaj la spacon: homoj el ĉiuj tempoj kaj lokoj kunlaboradas kun ni por la progreso de la nia kaj de la cstantaj generacioj. Nin ĉiujn ligas nur la dia kapablo de l' parolo. La plej alta, nobla kaj forta povo de la homo estas en al lingvo. Kion do faros niaj pranepoj kiam ili posedos mondlingvon, radion, televizion?

ISMAEL GOMES BRAGA

ARE THE MEN SO SCARCE IN LIMA?? PERISH THE THOUGHT!!

The appreciative Esperanto women of Lima, recognizing that GOOD MEN are hard to find, and when found should not be worked too hard. Ergo: during the festive occasion of the EANA Congress, their men can sit on the sidelines and celebrate-- except one-wonder how he fell from grace?, guess he's not very bad-just on probation. Buck up old man, we all sympathize.



UNUECO

ESTAS FORTO

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

PENSU PRI VIAJ INFANOJ! CU ANKAŬ ILI ESTU ESPERANTISTOJ? SE JES... PAROLU AL ILI ESPERANTE

Oni ne multe parolas pri la problemo, ĉu esperantistoj alparolu Esperante siajn infanojn. Ni renkontis plurajn samcelanojn, kiuj eĉ asertis, ke tio estas tute sen utilo, ĉar infanoj tiom rapide forgesas... Nu, tiuj, kiuj pristudis la nomitan fenomenon, nur povas interkonsenti kun la asertantoj. Tamen... ekzistas simpla rimedo kontraŭ tio. Oni parolu kun sia(j) infano(j) nur Esperante. Tiam ne restas tempo forgesi la lernitan kaj baldaŭ la etulo (j) mirigos vin per agrable flua, belsona kaj senerara lingvo. Tiu rezulto kostas nur mal multe da peno: ni mem devas zorge kaj sisteme elekti la vortojn kaj jam iras glate la afero.

Ne atendu ĝis kiam la infanoj estas sufiĉe inteligentaj. Komencu tuj post la naskigo, kvazaŭ la suĉulo jam bone komprenus vin.

Tiel, vi povas prepari vin kaj evolui kune kun la etulo. Ĉar tio estas nepra kondiĉo, ke vi komprenu, kion povas kompreni suĉinfano.

Nur tiam vi povas konfirmigi vin dum la «konversacioj» al tiu evoluo. Se cirkonstancoj poste malhelpus viajn provojn, vi tamen gajnus multe, ĉar vi klerigus vin mem, do helpus la movadon.

...Ekzistas instanco en la Esperantomovado, kiu speciale atentis pri ĉi tiu flanko de nia laboro: ĝia nomo estas «Denaska Esperantistaro».

La arangantoj bone scias, ke la plimulto de la esperantistaj gepatroj dediĉus ĉiujn siajn infanojn al la idealo, sed alvenas en la vivo tiom multaj aliaj aferoj, ofte pli necesaj ol la laboro por niaj esp. idealoj.

Pensu pri dommastrumado, pri la taga laboro, laboro por asocioj kaj sindikato. Alvenas eble malsanoj, senlaboreco aŭ pluraj geidoj kaj la malpli obstinaj kunbatajntoj ŝovas flanken la penojn por edukado laŭ niaj principoj.

La celo de «Denaska Esperantistaro» estas instigi tiujn gepatrojn, kiuj la infanojn tiel, ke ili fariĝu dulingvanoj, laŭ naturaj Esperantistoj.

Kiam la infano eniras la lernejon, ĝi jam estas sufiĉe bone preparita, ke ĝi povas defendi sin per la bona ekzemplo kaj per simplaj argumentoj kontraŭ ĉiuj mokantoj.

La estraro de D. E. ĉelas interkonatigi infanojn kaj junulojn el diversaj landoj. Ĝi volonte kunlaboras kun samcelaj instancoj, kun redakcioj de infangazetoj, kun tendumamantaj grupoj ĉie en la mondo. Ĝi konsilas al instruantoj, plifaciligas la eldonadon de taŭgaj instrumentalaroj, ĝi donas sugestojn kaj volonte akceptas ĉiujn ajn sciligojn pri la problemo. Kreigi novajn generaciojn ĝi ĉelas. Helpu laŭpove. Enskribigu viajn infanojn, sendu vian adreson, promesu labori kiel instigant(in)o aŭ onkl(in)o. La jarkotizo (0.5 Sv. fr.) certe ne malhelpas vian entuziasmon. Vi povas sendi ankaŭ adresojn de personoj, kiuj eble volas kunlabori. Skribu tuj al S-ino J. W. Neal, 48, Elvondon Road, London, N.13, kiu ĉiam estas preta respondi vin. Petu informojn kaj preparolu la «por» kaj la «kontraŭ» de ĉi tiu nova instanco kun viaj geamikoj. Ĉiu estas bonvena!

W. Koopmans, Amersfoort.

P. S. — Bonaj adresoj por infanoj-esperantistoj estas:

6. «La Juna Vivo», infangazeto de «Tutmonda Junular-Organizo», Westgraftdyk (Ned.) jarabono 1 Nglđ (= 2 internaciaj respondkuponoj).

«ARGENTINO». Inter 18-29 de Septembro en Buenos Aires okazis la unua amrika kongreso prilingva. Dum tiu kongreso estis prezentita propono enkonduki Esperanton en la instruistajn lernejojn. La propono estis ŝimpatie renkontita kaj ricevis rekomendon. Do, kiel ni vidas, la sudamerikanoj ne dormetas, sed laboras sukcese!

"Litova Stelo"

ANOTHER ESPERANTIST GOES TO THE GREAT BEYOND. We have just been informed by Miss Lillian Holm of Chicago, of the passing of her father, J.T.Holm, a one time member of E A N A. Our sincere sympathy goes out to his family and friends

«Coin Esperantiste». «TRAVAIL»

I.E.L. KOMENCAS NOVAN JARON

Heroldo de Esperanto

Neniu povas bedaŭri la forpason de la jaro 1939. Ĝi estis jaro, en kiu venis krizo post krizo, ĝis en Septembro fine eksplodis la milito, kiu dum tiom da tempo nin minacis. Por ni Esperantistoj ĝi estis aparte malbona, ĉar en ĝi malaperis nia movado en la cetera parto de Ĉeĥoslovakujo, en Polujo, kaj en Hispanujo; kaj fine de la jaro ni vidis danĝeron por ĝi en Finnlando. Ni esperu, ke en 1940 venos la sopirata paco, kaj ke post ne longe ni povos denove bonvenigi en niajn vicajn la dumtempe perditajn amikojn.

Por I.E.L. la jaro estis plena de mal-facilaĵoj. La krizo en la printempo malhelpis la varbadon de membroj, ne nur por I.E.L., sed ankaŭ por la Berna Kongreso: kaj kompreneble tio malbone influis niajn enspezojn. Poste la milito necesigis la nuligon de la aranĝoj por la Kongreso de 1940 en Marseille, kaj ĝi malhelpis ankaŭ la sendon de kotizoj el kelkaj landoj.

Malgraŭ tio, de la financa vidpunkto 1939 estis nia plej bona jaro ĝis nun. La kontoj publikigis en la jarlibro; sed ni povas diri jam nun, ke kvankam okazis deficitio, ĝi estis multe pli malgranda, ol en antaŭaj jaroj. Aliflanke, dank' al centoj da samideanoj, kiuj helpis al ni per donacoj grandaj kaj malgrandaj, kaj per aketo de kuponlibretoj, la sumo de la deficitioj malpliigis je £143. La listo estas multe tro longa por publikigo ĉi tie, sed ni sincere dankas al ĉiu aparta helpinto.

Ĉi tie estas oportuna loko mencii, ke S-ro T. J. Gueritte ĵus denove helpis al ni per nova donaco (£50) por la forigo de la deficitio. En sia letero li esprimis la esperon, ke ankaŭ aliaj helpos tiucele. Ni tute ne deziras ĉiam peti donacojn; tamen ĉiu konsentos, ke estos ĝojiga tago, kiam tiu nubo estos forpelita.

MOUNT HERMON, MASS., Public School has a large Esperanto class, and Mr. Paul F. Wilson, its teacher is confident that the enthusiasm shown now, will last. ESPEREGO!



YOU CAN'T TAKE IT WITH YOU! All sensible people know that they cannot take their worldly goods with them on the final trip, and they make provision for its distribution before too late: to relations, friends and worthy charitable or educational institutions, etc. If you are an Esperantist-or friend of Esperanto-you realize that there is no more worthy project in the educational field than Esperanto-IT MEANS EVENTUAL WORLD PEACE. FILL OUT BELOW.

I hereby bequeath to the Esperanto Association of North America, an important society for the dissemination of Education-the Esperanto Language-now located in the city of Washington, D.C. the sum of

Witnesses

Date

Signed

.....

SKOLTOJ.

SENPAĜA KORESPONDO-SERVO POR GESKOLTOJ KAJ ALIAJ GEJUNULOJ. „Estu Preta“, nova Esperanta instru-gazeto por Usonanoj, deziras adresojn de eksterlandaj gejoj por sia korespondoservo. La nura kondiĉo estas frua respondo al ricevita korespondaĵo. Ni pizorgos, por ke oni ne ricevu pli ol la deziritan nombron da komunikaĵoj. Sendu klare skribitajn adresojn al: „Estu Preta“, WINCHESTER, Illinois, Usono, Poŝtkarto sufiĉos.

„Litova Stelo“

 JUGOSLAVUJO. Nuntempe el Balkanaj landoj plej forta Esperanto-Movado estas en Jugoslavujo, en Kroata lando. Precipe aktiva estas Akademia Esperantista Klubo en Zagreb. Ĝi aranĝas ne nur perfektigvesperojn kun abunda kaj interesa programo, sed ankaŭ ofte aranĝas propagandajn prelegojn. Estis aranĝita „Esperanto — semajno“. La prezidanto de Jugoslavia Esperanto — Ligo estas fama oratoro Dro Ivo Lapezna.

Tamen, eĉ en la nunaj grizaj tagoj, ne necesas malesperi. Kvankam ni portempe perdis membrojn en kelkaj landoj, aliaj jam komencis pleniĝi la truon. Ni ŝparas en la oficejo laŭ ĉiu eblo, kaj ni opinias, ke eĉ en la nuna jaro la rezulto estos kontentiga. La unua parto de la jarlibro aperos en Marto, kaj niaj gazetoj daŭre aperadas regule. Ni certe ne nur konservos la organizaĵon, sed eĉ esperas ĝin plibonigi, kondiĉe, ke niaj membroj restu fidelaj.

Fine, ne forgesu, ke pli ol io ajn la milito montros la neceson por internacia lingvo. Nur Esperanto kapablas plenumi tiun rolon. Sed ĝia sukceso dependas plejparte de la Esperantistaro mem. Se ni daŭrigos la laboron kaj ne perdos la kuragon, la sukceso tiel longe sopirata estas certa. Faru novjaran decidon, ke vi ne nur restos fidela, sed ankaŭ klopodos ĉiumaniere pligrandigi niajn vicajn.

THE BRITISH ESPERANTIST C. C. G.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

„JOY OF THE MORNING“

This is the name of a well known poem by Edwin Markham, that grand old American of the present day who so symbolizes the sentiment of virile optimism. Below is an Esperanto version, prepared in coloboration by Arthur E. Regal, Chicago, and E.G. Dodge, Washington.

„ĜOJO FRUMATENA“

Mi aŭdas vin, birdeto kara.
 Svingante kanti, muro sur malnova.
 Pli laŭte kriui! Necesas kant' plej pova.
 Kantadu en densej' al mia animo!
 Tagiĝ' mirinda, senkompara!
 Ĝin dirus mi -- ne povas rimo.



★ Dum la tagiĝ', en lum' trankvila,
 Eklevis nubojn, montojn disen puŝis,
 Min tia glori enkor' ofte tuŝis --
 (La de l' natur' ekmovo misterplena)
 Sed mankis al mi via gorgo trila,
 Kaj aŭskultant' komprena.

.....

PRI LEGADO DE ESPERANTA LITERATURO

THE BRITISH ESPERANTIST

Preskaŭ ĉiam, kiam mi demandas "Ĉu vi legis multe da Esperantaj libroj?", oni respondas "Ne, mi ne multe legas: mi nur parolas iomete, kaj okaze skribas Esperante al amikoj".

Nu, laŭ mia opinio, tio estas bedaŭrinda, ĉar la sentenco "Legante, oni lernas" estas aparte vera pri nia lingvo. Sendube estas bone paroli kaj skribi Esperanton; sed se oni ankaŭ multe legas, tio tre grandigas la povon sin esprimi kaj skribi kaj parole.

Per legado oni (a) riĉigas la vortprovizon; (b) lernas gramatikajn formojn preskaŭ senkonscie; (c) akiras bonan stilon; (d) iĝas observema, kaj trovas, legante, ke eraroj kvazaŭ saltas al la okuloj; (e) gajnas kapablon taksu la valoron de la teksto; (f) stimuliĝas verki originale; kaj (g) larĝigas la spiriton. Ni pripensu tiujn punktojn.

Per legado oni riĉigas la vortprovizon. Tio estas bonega akiro, ĉar estas multe pli facile verki, sciante tri mil vortojn, ol sciante nur tricenton. Kun vortprovizo limigita oni devas lukti, por esprimi la ideojn; sed kiam oni posedas riĉan provizon da vortoj, la frazoj povas flui senĝene, klare, kaj bele. Estas vera ĝojo senti sin kapabla uzi Esperanton tiel facile, kiel la gepatran lingvon. Tion oni ne akiras sen multe da legado. Legante, oni tute forgesas pri gramatikaj terminoj kaj reguloj; tamen la cerbo ensorbas la spiriton de la lingvo, kaj tio helpas, ke la penso esprimiĝu bonstile.

Ofte oni demandas "Kio do estas bona stilo"? Nu, kiam mi komencis lerni, la instruisto diris al mi "Via stilo estas iom peza: vi devas akiri bonan stilon". Mi ja deziris tion fari; tamen mi ne sciis, el kio konsistas "bona stilo" Esperanta. Kompreneble, esprimo ĝusta en la lingvo Angla ofte sonas tute alie en Esperanto. Ekzemple, oni povas bone diri "Pray allow me to assist you", sed ne traduki laŭvorte "Preĝu lasu min helpi vin". Pli ĝuste oni dirus "Permesu, ke mi vin helpu". Oni devas do traduki ne vortojn, sed ideojn.

Plejparte mi komprenis la esencon de bona stilo per la legado de Esperantaj libroj verkitaŭ tradukitaŭ de bonaj aŭtoroj: precipe Zamenhof, Lydia Zamenhof, Baghy, kaj Bullhuis. Iom post iom mi ensorbis la karakterizaĵojn de Esperanto, kaj eksentis, ke la lingvo komencas vivi kaj nature flui.

Estas bone povi taksu la valoron de verko. Tiu povo kreskas el multa legado. Legi

romanojn kaj gazetojn estas interese, sed ankoraŭ pli grave estas legi la historion de nia movado, kaj verkojn seriozajn kaj unuarangajn. Ne ĉiu presitaĵo estas verko modela aŭ eĉ bonstila.

Por esti fidelaj disĉiploj de nia majstro, ni devas disvastigi Esperanton kaj ĝian belan idealon tra la tuta mondo. Celante tion, ni strebu al sperteco ĉiuflanka, kaj al tio nenio pli helpas, ol konstanta legado.

Por la vivo kaj kresko de nia lingvo ni bezonas pli da verkistoj kaj tradukistoj vere bonaj. Ni do legu diligente; memorante, ke atenta studado de fidindaj modeloj estas unu ĉefa rimedo ellerni la lingvon.

HYLDA MAYNE, D.B.E.A.



AMIKOJ



Homo, kiu havas amikojn, povas esti feliĉa. Homo sen amikoj ne povas esti tre feliĉa.

Amikeco estas grandioza, grava afero en la vivo de ordinaraj homoj, kaj amikoj multe kaj forte influas la vivmanieron de ĉiu. Ĉu ni ne faras grandajn klopodojn por doni plezuron al niaj amikoj? Ĉu ni ne akceptas kun granda ĝojo ĉiun signon de amikeco, kiun montras al ni la personoj, kiujn ni konas?

Amikoj forprenas de ni tiun senton de soleco, kiu kelkfoje venas al ni dum la mallumaj tagoj de malsaneco. Amikoj donas la plej grandan konsolon, kiam oni perdas unu el la gepatroj aŭ alian parencon. Bonaj amikoj, malgraŭ la propra manko de riĉoj, helpas nin en la mizeraj tempoj de malriĉeco.

La amikojn ni bezonas por nia propra feliĉo. Ilin ni deziras por nia plezuro. Per ili ni esperas ricevi ĝojon kaj agrablajn horojn. Do, ni reciproke montru al ili nian kunsenton, nian simpatian, niajn plej koran afablecon kaj konsideremon. Nur tiel ni meritas la varman amikecon kaj nur tiel ni atingos ĝin.

P.E. DaGogo

Parolas la maistro

(«La Esperantisto», 1891.)

La graveco de nia afero estas nia fera stilo, kaj laborado, konstanteco kaj pacienco, pacienco, konstanteco kaj laborado, konstanteco, laborado kaj pacienco estas la fortoj, per kiuj ni devas venki.

33rd EANA Congress, Lima, Ohio

ARCANUM ESPERANTO CLUB recently formed in the city of Arcanum, Pa., with the following officers: Thad Murphy, Pres. Glen Broughman, V-Pres., and Leader. Bob Cheadle Sec'y & Treas., and G. G. Starr, Faculty Adviser. All the members are students at the ARCANUM HIGH SCHOOL.

UNUECO ESTAS FORTO JOINT CELEBRATION

ESPERANTO FESTIVAL and Dance.

Tendered jointly by the New York-Brooklyn-Harmonia, Esperanto Societies. Friday April 12 at 8.30 In Midtown Music Hall, 846 7th Ave (at 54th St.) A grand combination of Entertainment, Refreshments and Good Spirits are Guaranteed to all.

The N.Y. "Herald-Tribune" recently carried a full column, on the introduction of ESPERANTO, Latin, Italian and French, in 15 of the Elementary Schhols of the Metropolitan Dist.

THE "HEROLDO DE ĈINIO"

published in Chungking, China, while devoting the most of its space to the depredations of the Japanese armies, carries much that is interesting about the industrial and agricultural activities in spite of the war.

SEVERAL EUROPEAN ESPERANTO

papers devote much space to the movie "Road to Singapore", being made in Hollywood.

HUNGARIAN RED CROSS USES ESPERANTO. The Hungarian War Minister, replying to a letter from the Hungarian Esperanto Federation, informed them of his willingness that Esperanto be used and he advised the Hungarian Red Cross Society to use it. The Society informed the Federation that it had officially adopted Esperanto for use in its work. "Heroldo de Esperanto"

EVERY ESPERANTIST SHOULD BE A MEMBER OF EANA AND IEL*AND BRING IN ANOTHER MEMBER-U&U&U&U.

SE VIA MEMBROKOTIZO DEVAS ESTI PAGATA NUN AŬ BALDAŬ VI TROVAS KOLORAN KRUCON APUD VIA NOMO SUR LA KOVERTO !.!.!

LA NOVA JARO

ALVOKO de E. MALMGREN, Vic-Prezidanto de I.E.L.

La nova jaro, 1940, kiel eta knabo frapas la pordon de la Tempo. Sed kiam la pordo malfermiĝas, la knabo ektimas, ĉar li vidas antaŭ si militantan mondon.

Esperantistoj! Ĉu ni ne faru same? En la nuna tempo, kiam la plenkreskaj homoj sin okupas pri milito kaj ekstermo, ĉu Esperanto ne turnu sin al la infanoj de la mondo?

Multfoje ni aŭdis la devizon: Esperanto en la lernejon! Kaj ni ĉiuj entuziasmiĝis pri tiu devizo, ĉar ĝi ja montras la fincelon de niaj penadoj. Ni neniam forgesu la bori por tiu celo!

Sed - «estas longa vojo al Tipperary».

Kiam mi estis infano, mi kontaktiĝis kun multaj infan-grupoj: dimanĉa lernejo de la kristana asocio, infangrupo de la abstinenta loĝio, la skolta movado kaj la infangrupo de Ruĝa Kruco.

Kunlaborantoj tra la tuta mondo! La nuna milita tempo certe malfaciligas la varbadon por Esperanto inter plenkreskuloj. Ĉar ili ĝenerale ne povas deteni siajn pensojn de la aktualaj okazaĵoj.

En ĉiu Esperanto-klubo estu unu infansekcio, - tio estas: Ĉiu Esperanto-klubo aranĝu almenaŭ unu infankurson kaj starigu poste unu infansekcion.

Esperantistoj! Se ni tra la tuta mondo aranĝos tiajn infankursojn, ni post kelkaj jaroj havos junan gvardion, kiu kun pli granda energio ol ni, pli granda lerteco ol ni, gvidos nian movadon al finvenko!

eluzos la militan tempon, ĉar ni kreos al ni la plej bonan bazon por la venonta paca tempo:

La junularo estos nia!



KIEL ORGANIZI INFANKURSOJN?

- 1. Elektu en via Esperanto-klubo specialan komitaton por prizorgi la infankurson. (En la komitato estu ekz. tri personoj, prefere virinoj, ĉar ili kutime pleje taŭgas por tia laboro.)
- 2. Varbu ĉ. 10 infanojn (el ili kompreneble antaŭ ĉio la infanojn de la esperantistoj).
- 3. La infangrupo havu apartan nomon, ekz. «Amika Rondo». (La infanoj certe estos tre kontentaj pri sia membreco en «Amika Rondo»; oni ne postulu membrokotizon.)
- 4. «Amika Rondo» kunvenu unu posttagmezon ĉiusemajne. (Kunveno estu aŭ la klubejo aŭ la hejmo de iu el la komitatanoj.)
- 5. Unu el la komitatanoj estu la gvidant(in)o de «Amika Rondo».
- 6. La programo de la kunvenoj de «Amika Rondo» estu ekz.: a) Kanto (iu facila esperantigita nacia kanto). b) Esperanto-instruado (dum proksimume 30 minutoj; oni instruu laŭ la plej taŭga infanlernolibro aŭ laŭ la Cseh-metodo aplikita por infankursoj; prefere la Esperanto-klubo zorgu pri senpagaj lernolibroj por la infansekcio). c) Laŭtlege iun interesan rakonton (en la gepatra lingvo pri eksterlandaj infanoj aŭ io simila). d) Kanto. e) Korespondado kun la eksterlando (kaj filatelio).
- 7. La tuta programo ne estu pli ol 1 1/2-hora. Neniam aranĝu la kunvenojn tro malfrue, ĉar tiam plendos la gepatroj de la infanoj. Esenca postulo estas, ke la kunvenoj estu interesaj kaj allogaj por la infanoj, por ke ili faru bonan reklamon inter siaj kamaradoj. Kiam oni post duona jaro aŭ post unu jaro komencos novan kurson, oni tiam jam je la komenco havos plenan grupon. La infanoj havu la aĝon de 11-14 jaroj.
- 8. Kiam via klubo okazigos infankurson (infansekcion), sendu mallongan informon al Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo. Indiku vian plenan adreson, kaj ĉu vi deziras korespondi (eventuale kun kiuj landoj).
- 9. Je la fino de la jaro 1940 ni konstatos, en kiu lando la Esperanto-kluboj plej lerte kaj plej multnombre aranĝis infansekciojn. Ek al interesa laboro!

THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, WILL HAVE A BIRTHDAY. Thirty five years ago, on March 23rd 1905, at the sixth meeting of BOSTON ESPERANTO SOCIETY, the American Esperanto Association-- afterwards changed to the ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA--was organized. Few are still living of those who took part in the early meetings of the association, but the records contain the names of those pioneers, and the Esperantists of Boston are preparing to celebrate the formation of EANA, by a meeting on March 30th, 1940 at 8 p.m.p. In the International Institute on Beacon St. Here is the roll of first officers elected in the EANA. President, Chas.H.Matchett. 1st V-Pres., John G.Robinson. 2nd V-Pres., Lyman Atkins. Rec.Sec'y, Edward K.Harvey. Cor.Sec'y, John Fogg Twombly. Treas., Frank O.Baker. Mr.John Fogg Twombly is the only person now living of the above list.

It is hoped that other chapters will take notice of this anniversary date during March. ANTAŬEN OBTINE!

Parko por blinduloj.

Blinduloj ne povas vidi; sed kutime estas des pli evoluantaj ĉe ili la ceteraj sensoj. Floroj ĝojigas la vidantan homon per siaj koloro kaj formo kaj, ankoraŭ pli, per sia bonodoro. Sed la bonodoron de la floroj povas ĝui ankaŭ blindulo. En Ĉikago ekzistas parko speciale por blinduloj, kaj estas tie plantitaj precipe floroj kaj plantoj kun forta bonodoro. Ekzemple, anstataŭ salikoj, oni trovas grandajn bedojn da timiano, kaj la plantoj estas tiel elektitaj ke dum la tuta jaro unu fortodora flor- aŭ plantospeco sekvas la alian. La parko estas fondita laŭ la deziro de bonstata blinda floramiko, kiu destinis sian kapitalon por la aranĝo de tia parko. "Zigzago"

UNUECO ESTAS FORTO

Heroldo de Esperanto

ESPERANTO IN BRAZIL. Last year the Brazilian Geographical and Statistical Institute decided to employ ESPERANTO in its publications for abroad. This step has now been followed up this year by a decision to introduce the language as an obligatory subject in the instructional courses for members of the State statistical service. Following upon the recent endorsement of ESPERANTO by the Brazilian Council of Education, this represents a further important recognition of the language by the State authorities. (El "The British Esperantist")

FRANCUJO

En Francujo la mobilizo forŝiris multajn aktivulojn de nia movado el ilia pli frua agadloko. Kelkaj samideanoj jam falis ĉe la fronto viktimo al la milito.

S-ro Pierre Petit, la nelacigebla konstanta sekretario de la Societo Franca por la Propagando de Esperanto, devis iri al Le Mans, kaj kun li tien migris ankaŭ la sidejo de SFPE. (Adreso: chez Madame Grimault, 21, rue Lionel-Royer.) S-ro Jean Couteaux kaj Belhoste restas provizore en Parizo, la prezidanto de SFPE, s-ro Ernest Archdeacon, restas en Saint-Cloud, sur sia jakto « Esperanto ». Ankaŭ s-ro generalo Bastien, la prezidanto de IEL, toriris el Parizo al nova adreso.

Dum iom da tempo, post la militeksplo- do, evidente pro iu miskompreno aŭ eraro, estis malpermesite en Francujo eldoni presaĵojn en Esperanto (ne pri Esperanto), sed evidente la francaj gesamideanoj jam sukcesis atingi la nuligon de tiu malpermeso.

Aperis de post la militeksplo- do numeroj de « Franca Esperantisto »: por septembro-oktobro kaj por novembro-decembro.

En la septembra-oktobra numero skribas Jean Couteaux i.a.:

« Estas necese, efektive, ke niaj grupoj multigu sian agemecon dum tiu milito, aŭ por helpi la esperantistojn de l'Oriento pelitaj for de la hejmoj, aŭ por korespondadi kun la aliĝantoj mobilizitaj en la armeoj, kaj alporti al ili la necesan kuragi- gon materialan kaj moralan; aŭ por kon- servi la rilatojn kun la samideanoj de la fremdaj landoj, tute egale por la gardado de la interesoj de nia lando, kiel por la savo de la idealo de interpopola trateco kiu estas, pli ol iam, kaj malgraŭ ĉio, la celo de niaj penoj kaj de nia propagando.»

« Ni insiste petas ĉiujn prezidantojn kaj sekretariojn de niaj grupoj daŭrigi la vivon de la organizaĵoj, pri kiuj ili konsentis respondi. Nia movado devas trapasi tra la milito senperda, por ke ĝi povu larĝe dis- vastiĝi dum la unuaj tagoj de la paco re- trovita, en mondo kiu fine komprenos, ni esperas, la maldignecon de tiuj organizataj mortigoj, kie la homo ne eĉ atingas la mor- alan nivelon de la besto, kaj utiligas sian mizeran potencon nur por detrui kaj mor- to.»

En la numero de novembro-decembro, s-ro generalo Bastien demandas: « Cu Esperanto trapasos la militempon? » kaj, fine de sia artikolo, donas la respondon: « Resume, ni povas esti certaj ke, post la milito, la Landaj Asocioj, grupĝintaj cir- kaŭ IEL, estos pretaj por fari furiozan propagandon, kiam la homoj en ĉiuj landoj sopiros al vera definitiva paco, kaj tiam nia idealo triumfos.»

Kaj en la sama numero diras P. Petit: « Kiam, en la nunaj cirkonstancoj, oni ha- vas la bonŝancon posedi idealon kiel la- nian, oni ne rajtas esti pesimista. For la pesimisman, ĉiuj al laboro, por la finsuk- ceso de Esperanto en la nova Eŭropo! »

FINNLANDO

En Finnlando, antaŭ la al ĝi aldevigita milito, la intereso por Esperanto estis rekreskanta post multjara stagno. Tion ilus- tras ankaŭ la jena raporto, aperinta en « Hufvudstadsbladet », Helsinki, 8.9.1939:

LA STUDENTAJ EKZAMENOJ

Dum la aŭtunaj studentaj ekzamenoj oni do- nis hieraŭ pruvon pri fremdlingvoj. En la ger- mana estis donita jena tasko:

Traduko al la germana:

La malavantaĝoj, kiujn la uzado de multinom- braj lingvoj en la mondtrafiko multoble kun- portas kun si, kaj la malfacileco de lia plena regado, jam de jarcentoj venigis al la homoj la ideon elformi laŭcelan helplingvon. Dum la mezepoko oni atingis ĉi tiun celon per la vasta uzado de la latino, kiun en la okcidenta mondo preskaŭ ĉiuj kleruloj regis kaj kiun eĉ la kom- mercistoj uzis en sia korespondado ĝis la 14-a jarcento. Sed samtempe kun la formorto de la latina kiel vivanta lingvo, baldaŭ oni sentis la bezonon pri nova helplingvo. Dum certa perio- do, t.e. en la 18-a jarcento, ŝajnis, ke la franca kapablas surpreni ĉi tiun taskon, kaj ĝi plenu- mis tiun taskon ĝis nun sur la tereno de la politika vivo. De la 19-a jarcento oni kredis vokita per tiu ĉi rolo la anglan pro ĝia granda disvastigo. Sed la pli iorta nacia sento, kiu nuntempe rejas ĉiujn landojn, igas tre malver- ŝajna, ke la lingvo de certa lando entute povos fariĝi mondlingvo. Tial oni kreis artefaritajn mondlingvojn. Jam en la 17-a jarcento okupiĝis kelkaj filozofoj pri tiu ĉi demando. En la dua duono de l'antaŭa jarcento Volapük, mon- dlingvo konstruita sur germana bazo, atingis su- fiĉe gravan sukceson, sed poste ĝi tute esting- iĝis.

Tradukota al la germana:

La plej konata el ĉiuj helplingvoj estas Espe- ranto. Ĝi estis elpensita antaŭ duona jarcento de pola kuracisto. Tiu regis krom sia patrin- lingvo ankaŭ la germanan, francan kaj anglan. Sur la bazo de tiuj ĉi lingvoj li kreis artefari- tan mondlingvon, elektinte el ĉiu lingvo vortojn laŭcelajn. Antaŭ ĉio li provis igi la gramatikon kion eble plej facila. Tamen en Esperanto ne mankas malfacilaĵoj, ĉar ankaŭ en artefarita lingvo oni devas lerni grandan amason da vortoj kaj esprimoj. *

Ĉi tiuj taskoj por la studentoj do estis bonega propagando por nia ideo kaj nia lingvo. Oni povas pensi ke la profesoro de la germana lingvo, kiu donis al la studentoj tiujn taskojn, mem estas esperantisto.

Nun la finnaj samideanoj uzas Esperan- ton por informi la eksterlandon pri la vera karaktero de la finna-rusa konflikto.

La unua maŝinskribita manuskripto jam en 1874.

Ja nature, iu manuskripto devis esti la unua skribita per maŝino. Sed estas mal- multe konate ke tio okazis jam en la jaro 1874. Kaj ankoraŭ pli malmulte konate estas ke la unua verkisto, kiu liveris ma- ŝinskribitan manuskripton al sia eldonisto, estis la genia amerika bonhumora verkisto Mark Twain. Tiu manuskripto estis « La aventuroj de Tom Sawyer », kiu en la jaro 1874 estis finita.

ESPERANTO by CORRESPONDENCE-BEGINNERS and ADVANCED. E.A.N.A. Licensed Teacher. Address: ESPERANTO-BY-MAIL, ST. ALBANS, N.Y.

ĈEHO-MORAVIO

Niaj legantoj certe miros, aŭdante ke en tiu restaĵo de la iama Ĉeĥo-Slovaka Res- publiko, nun enkorpiĝita en la Germana Regno, daŭras la iama Esperanto-asocio, sub la nova nomo Ĉeĥa Esperanto-Asocio, kaj ke sub la dato 29-a de novembro 1939 ĝi ankoraŭ eldonis bele presitan numeron de sia organo « Ligilo ».

La asocio havis sian ĝeneralan kunvenon en Praha, la 16-an de septembro, kiu deci- dis konservi la oficejon en Praha (II, Truhlářská 16) kaj plu eldoni sian organon. La agado de la asocio rilatas al ŝtat- anoj de la Protektorato Bohemio kaj Mo- ravio, kiuj estas laŭ nacieco ĉeĥoj; alina- cianoj (do germanoj) ne povas esti mem- broj. Prezidanto estas Jos. Friedrich en Brno, vicprezidantoj K. Koutek en Praha kaj D-ro St. Kamaryt en Chotebor.

En Praha « malgraŭ la malfacilaj tempoj la Esperantista klubo kapablis firme eniri sian 37-an jaron. Regula kunvena vivo, baze de laŭleĝa plupermeso, daŭris en la kutima maniero, precipe en la formo de la normalaj ĉiuvendredaj renkontiĝoj, kies meznombra ĉeestado atingadis 30 person- ojn. » La klubo havas ankoraŭ pli ol 100 asociajn membrojn! Okazas kursoj por komencantoj kaj progresintoj.

En Brno daŭras la kluboj neŭtrala kaj katolika, la klubo de Hr. Kralové eĉ rap- ortas vigan laboron, kluboj en Holešov, Kladno, kaj la klubo TRAKT (ĉe la radio- stacio) en Brno malfondiĝis.

En Kamenny Ujezd u Rokycan oni in- tencas fondi lokan Esperanto-klubon.

Bravo, karaj geamikoj ĉeĥaj!

DANLANDO

En Danlando la Esperanto-vivo esta- vigla; sed de post la militkomenco atingis nin nur la novembro numero de « Dansk Esperanto-Blad » kaj tri numeroj de nova gazeto « Dansk Esperanto Tidende ». La prezidanto de Centra Dana Esperantista Ligo, D-ro Justesen, faris je propraj kostoj dumonatan rondvojaĝon por viziti la grup- ojn tra la lando.

En Fredericia okazas tri kursoj kun en- tute 75 partoprenantoj — rekordcifero pli frue ne atingita en tiu urbo.

Gesinjoroj Weide gvidas kursojn en Vejle, Jelling, Thyregod, Give, Egtved kaj Aagaard kun entute ĉ. 120 personoj.

ESTONIO

Novaj kursoj en Tallinn, kaj kurso por skoltoj en Antsla. Kelkaj fervoraj estonaj esperantistoj pro transiro al germana civi- taneco forlasis la landon, inter ili s-roj Edgar Zapp, Edmund Grünthal, s-ino E. Goldberg el Tallinn, kaj s-ro H.K. Zelin- sky el Tartu.

La organo (« Informoj de Esperanto- Asocio de Estonio ») regule aperas, nun dumonate.

"Heroldo de Esperanto"
